

Heinrich Heine,
Im Mai

Heinrich Heine,
En Majo

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

Heinrich Heine,
En la mirida bela Maj’

tradukita de Manfredo Ratislavo

tradukita de Friedrich Pillath

tradukita de Kálmán Kalocsay

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

En Majo, kiam ĉiuj
Burgonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor’ estiĝis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burgonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burgonoj fendis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab’ ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poeemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocŝajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)